6-a Jaro, N-o 299 APERAS SEMAJNE Leipzig, 26./6. 1930



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

IMPRESOJ PRI LA SITUACIO EN PALESTINO

Estas malfacile fari al si ĝustan bildon pri la diversaj celadoj k aspiroj de l' nuna Palestina loĝantaro k ankaŭ pri la rolo, kiun ludas k povos estonte pli klare ludi la laboristaro en tiu lando.

Ni scias, ke Palestino troviĝas sub la regado de brita mandat-registaro, kun sidejo en Haifa, urbo lokita sur marbordo, sed pli malproksima de Jeruzalemo ol Jafa, kiu ludis ĝis nun pli gravan rolon kiel haveno ol la brita registarsidejo. Britio, kiu promesis dum la mondmilito al la araboj subteni ilian nacian liberiĝ-celadon, aliflanke faris favorajn decidojn por la cionista movado, ekestis sekve en dilemo, kiam ĝi ekprenis sian mandaton.

La araboj havas la malesperan impreson, esti laŭgrade forpuŝataj pro la amasa juda enmigrado. La teritorio estas malgranda, k nur ioma parto ĝia estas utiligebla. Jam la cionistaj kolonioj okupas la pliparton el plej bona grundo.

La araboj sentas, ke la judoj ne intencas miksiĝi kun la cetera loĝantaro, sed volas resti distinga komunumo, kun propra lingvo k apartaj institucioj. Eĉ rilate al la laborista movado tio havas signifon, se ni ne konsideras malgrandan escepton, pri kiu ni raportis en n-o 292: nome, ĉe la sindikatoj de fervojistoj k poŝttelegrafistoj la organiz-sistemo permesas la unuiĝon de arabaj k judaj laboristoj! Sed cetere "la arabaj laboristoj estas devigataj nun resti neorganizitaj, ĉar la juda sindikato "Histraduth" (aliĝinta al la Amsterdama Sindikata Internacio) malakceptas arabojn"[1].

La araboj postulas aŭtonomion bazitan sur proporcia reprezentado. La judoj, kiuj formas nur malfortan malplimulton, kontraŭstaras al tio, timante esti superregataj de l' araboj k ke la grund-akiro povu esti haltigata aŭ severe limigata.



JERUZALEMO

Pripensemaj araboj maltrankviliĝas ankaŭ pri la rapida "okcidentiĝo" de la lando. Ili sentas la neeviteblon de tiu procezo, sed sentas ankaŭ, ke la juda influo plirapidigas la evoluon al *komercigo* de l' lando.

En la cionista koncepto la ĉefideo estas, ke la judo estas en Palestino, ĉar estas lia *rajto*. Certe temas pri rajto favore donita al li de Britio en konsento kun aliaj gvidantaj potencoj k la Ligo de Nacioj! Ankaŭ la cionistoj parolas pri historiaj rajtoj, sed fakte la izraelida okupo (same milita konkero kiel tiu de l' araboj) ne estis pli longdaŭra ol la araba.

Fakte, la judaj postuloj havas tute alian bazon. Estas decido k deziro tiel pasiaj, ke ili havas hipnotan povon, ke ili kunmiksiĝis kun la psiko de l' juda infano. Generacioj suferis persekutojn, humiligojn, mizeregon, ke ilin tenis la espero je Ciono. Ĉar ili ne havas apartan teron por si, sian "landon", ili volas havi tiun prapatran grundon je ĉia prezo. Tiu ĉi sento, grandparte bazita sur bibliaj promesoj, estas almenaŭ same forta ĉe la junaj modernaj koloniistoj, el kiuj multaj estas senreligiaj, kiel inter la piaj ortodoksuloj.

La fakto, ke la judoj sentas senpeziĝon en Palestino, pruvas, kiom multe ili suferis antaŭe, ke ilia arogo, pro kiu oni ofte plendas, estas nur natura reago. Kun granda fervoro k entuziasmo la cionismo nun klopodas krei landon, kiu ne nur estu "patrio" de longe senhejma popolo, sed la realigo de justa k frateca sociordo, kia ĝi estas antaŭvidita de Miŝe ĝis Marks. Ili forpuŝas la lukson k la profitavidon. Universitatuloj, viroj k virinoj, hakas ŝtonojn, konstruas ŝoseojn, sekigas malsanigajn marĉojn, transportas sterkon aŭ lernej-instruas por la gloro de Ciono. Mirinde, ili tute ne sentas venĝemon sekve de la mortpafadoj en pasinta aŭgusto.

Laŭ la juda tezo 90% el la araboj estas kontentaj vidi la judojn instaliĝi

[1] Laŭ K. Hinkel en ISK, Esp. eldono, aprilo 1930.

en Palestino, ĉar ili komprenus, kiajn avantaĝojn ili povus trovi per tio. Ke estus nur la klaso el malgrandaj oficistoj (precipe ekleziaj), kiuj timus perdi siajn politikajn k ekonomiajn privilegiojn k tial stimulus la religian fanatikon, disvastigante erarajn famojn pri intencoj judaj kontraŭ la mahometanaj sanktaj lokoj. Sed, laŭ la jam supre citita aŭtoro, K. Hinkel, ankaŭ "la judaj kamparanoj k laboristoj estas en la cionista movado k spirite dependas de la juda eklezio, kiu estas ligilo inter la judaj proletoj k la judaj kapitalistoj, k kiu estos fidela al la kontrakto kun Britio"; dum la arabaj proletoj, "la felahoj k beduenoj estas grandparte analfabetoj; spirite k politike, ili tute dependas de la mahometana eklezia estraro, kiu plue posedas la plej grandan parton de l' lando ..."[1]. "La urba proletaro (araba) ludas, laŭnombre, nur malgrandan rolon[2]."

Sed kio estas esperiga, estas la fakto, ke inter la araboj ekzistas malmulte da kontraŭsemitismo, tia kia estas trovebla ĉe la eŭropanoj k usonanoj en Palestino: la araboj ŝajnas senti la rasparencecon kun la judoj. Ankaŭ neniam la arabaj gvidantoj planis detrui la jam ekzistantajn judajn koloniojn, sed nur provis reguligi la enmigrantaran alfluon. Sur egalrajta reprezentado en komuna registaro, kun garantioj pri la rajtoj de l' malplimultoj, la araboj estas, laŭ la diroj de l' influhavaj ĉefoj, tute pretaj akcepti la judojn kiel "sampatrianojn".

La ĉefa demando solvenda de l' sindikata movado, certe estas tiu de l' enmigrado. Devas esti alcelata objektiva informiĝo pri la nombra eblo de absorbiĝo, k por la enmigrintoj same kiel por la araba malriĉularo devas esti aktive kondukata la batalo kontraŭ senlaboreco k ekonomia krizo, por akiro de fundamentaj laboristaj rajtoj, plenumo de elementaj sindikataj postuloj. Ambaŭflanke, ĉe judoj kiel ĉe araboj, ekzistas inter la laboristaro personoj, kiuj serĉas interamikiĝon k kontakton. La unuaj provoj de alproksimiĝo sur sindikata bazo estas faritaj. Kaj nur sur tiu vojo, nur en la komuna batalo de l' araba k juda laboristaro ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ la ekspluatantaro, en unuecaj organizoj sen dividiĝo laŭ naciaj sekcioj, povas kreiĝi tiu kuniĝo de l' malriĉaj arabaj kamplaboristoj k farmuloj kun la juda laborista enmigrintaro, kiu estas la necesa fundamento por antaŭenpuŝi en Palestino la socialismon.

Laŭ diversaj fontoj kompilita.

[1] ISK, Esp. eldono, aprilo 1930.
[2] Same.

POLAJ LABORISTOJ EN FRANCIO

En la du franciaj departementoj Nordo k Pa-de-Kale (*Pas-de-Calais*) vivas proksimume 190 mil polaj enmigrintoj, viroj, virinoj k infanoj. En la tieaj minejoj oni nombras 71 mil poldevenajn ministojn, edzaj aŭ fraŭlaj, kun ili 60 mil infanoj. La poloj laborantaj en aliaj industrioj k terkulturo, havas nur milon da infanoj kun si. La batalionoj de estontaj ekspluatatoj do troviĝas en la minejoj.

Pli ol 60 mil novaj polaj enmigrantoj alvenos Francion dum 1930 laŭ la interkonsentoj faritaj inter polaj k francaj entreprenoj. Ili venis k venas el la tri regionoj de l' iama rusa, aŭstria k germana Polio. La eksgermaniaj poloj formas la duonon, sed ili trapasis kiel etapon Vestfalion, la Rur (*Ruhr*)-basenon, kien la germana kapitalismo estis transplantinta ilin. Tial la poloj en Nordfrancio ne formas gente homogenan grupon. Ili diferencas laŭ karaktero k kutimoj.

La iame rusaj poloj pensas k kondutas kiel slavoj, inklinas speciale al komerco. Kvankam tre religiemaj, ili ne havas disvolvitan senton por grupiĝo k organiziĝo. Oni trovas ĉe ili komunistojn, klerikalulojn, plej diversopiniajn personojn, sed ne metode k organize laborantajn. Regas la individuisma karaktero, kiu formiĝis sub la cara reĝimo. La iam aŭstriaj polaj ministoj estas apenaŭ diferencaj de la unua speco. Sed tiuj, kiuj vivis longan tempon en la germanaj industriregionoj aŭ tie naskiĝis, havas la kulton pri metodo, estas grupiĝemaj, konas k aplikas laboristan disciplinon. Ili estas bonaj sindikatanoj en siaj korporacioj. Ili ŝatas esti puraj, sin vesti bonguste k havi ioman komforton en la loĝado. Malfacile ili povas ŝpari por kulturceloj, pro la malaltaj salajroj; sed se ili sukcesas ŝpari, tion ili ŝuldas al sia simpla nutraĵo.

Ankaŭ judaj elementoj troviĝas inter ili, kiuj estas pruntistoj k makleristoj, sed ludas entute sensignifan rolon.

Tiu amaso prezentas subproletaron, kiu reagas kontraŭ la kondiĉoj al ĝi diktitaj. Ĝi organiziĝas, kulturiĝas, kroĉiĝante al la nova medio, por supervenki la barojn k kontraŭstari la malhelpojn. Estas fortika speco, kiu rezistas en la peniga laboro de l' minejo kun tre kruda, simpla nutraĵo, ĉefe porkaĵo, lardo, terpomoj, k malforta kafo kiel preferata trinkaĵo. La bredado de unu aŭ pluraj porkoj estas la bazo de ilia familia mastrumo. Alia tre multe ĉe ili bredata besto estas la ansero.

La polaj infanoj lernas en samaj klasoj kune kun la francaj; tiel ili estas dulingvuloj. Post dudek jaroj ne plu ekzistos poloj en tiu regiono, kiuj ne parolas france. Sed la pli aĝaj personoj hodiaŭ nur malfacile adaptiĝas al fremda kulturo; tial ili ne povas vere kleriĝi k legas nur la plej facilajn, malestimindajn romanfelietonojn, dum la kino estas ilia ĉefa legaĵo. La sola, kio aparte disvolviĝas, estas kelkaj propraj kluboj, ĥoroj, muziksocietoj, ĝardenkulturaj k sportaj unuiĝoj.

Teorie tiuj ministoj havas laŭ la interkonsentita laborkontrakto mezbonan salajron, asekuron kontraŭ malsano k diversajn aliajn rajtojn. Sed praktike ekzistas multego da maljustoj, mizero, ŝuldiĝoj, punoj, eksterlandigoj, mastraj kontraktrompoj. Kontraŭ ĉio tio devas batali k batalas laŭ sia povo la minista sindikato, kiu havas plurajn polajn sekretariojn. 15 mil polaj ministoj estas sindikatanoj[1]. Aperas diverstendencaj polaj ĵurnaloj (ankaŭ mastraj). La sindikata ĵurnalo aperas regule; kunlaboras en ĝi francaj k polaj laboristoj en bona harmonio.

Estas do esperinde, ke iom post iom pli k pli da enmigrintaj polaj ministoj grupiĝos ĉirkaŭ siaj klasaj organizoj, por ke ili stariĝu en unu vico kune kun la francaj k multnombraj alinaciaj laboristoj okupitaj en Francio kontraŭ la komuna ekspluatanto: la mastraro. Nur kiam la naciecoj forviŝiĝos ĝis plena formalapero — k la evoluo tendencas en tiu direkto — la liberiga batalo de tiuj amasoj estos efika k rezultodona. —

G. d' H.

[1] En raporto, kiun ni presigis en n-o 278 sub titolo: "Alinaciaj laboristoj en Francio", oni parolas pri nur *3 mil* polaj minist-sindikatanoj. La diferenco kredeble estas en tio, ke la nombro de l' unua raporto rilatis al la anoj de komunismtendenca sindikato (C.G.T.U.), la ĉi supra al tiuj de socialisttendenca sind. (C.G.T.). — *Red.*

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO" ★

Ĵus aperis
esperanta originalo
ILI
de LEON BERGIERS
80 paĝoj. Formato: 17×21 cm.
Kovrilo dukolora, kun pluraj ilustraĵoj de Lucien Gilles k fotografaĵo.
Prezo: **1.80 mk g.**
Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O. 27.

EL USONA TAGLIBRO

Sukcese k pace la komunista k la socialista Partioj aparte manifestaciis la 1-an de majo. Sed pli frue, en la mateno, la eks-soldatoj k la patriotaj asocioj starigis kunvenon en la centra placo (*Union Square*) por protesti kontraŭ la ruĝula minaco. Spite la fakto, ke la Unua de Majo fariĝis laborista libertago pro la peto de la Amerika Federacio de Laboro, tiu ĉi sama Federacio nun, por distingi sin de la eŭropa movado, festas sian Labor-Tagon en septembro k bojkotas la 1-an de majo. La registaro helpas k fiksas Tagon de Infan-Bonfarto por tiu ĉi dato.

* * *

Inter la "aristokratoj de laboro" estas la presisto en ĉiu lando. Sed nun la minaco de la maŝino ankaŭ frontas lin. La ĵurnaloj tie ĉi komencas uzi "tele-kompostiston" (*teletypsetter*). Meĥanismo ricevas telegramojn k produktas truitan rubandon, per kiu oni presas la ĵurnalon anstataŭ per la linotipisto. Krome F. E. Ganet (*Gannett*), la posedanto de aro da ĉiutagaj ĵurnaloj k de tiu ĉi nova meĥanismo, komencas uzi la foto-procedon anstataŭ presado per metalmuldaĵo. La Sindikato de la Tipografistoj, nun batalanta por labor-semajno de 5 tagoj, devas atendi novan strikrompanton. Ouen D. Yang (*Owen D. Young*), ĉefo de Ĝenerala Elektro-Kompanio, jam profetis, ke oni baldaŭ legos ĵurnalon per radio k televidado.

En Denver (Kolorado) la organizitaj muzikistoj starigis teatron propran por kontraŭbatali la atakon ĉiean de la meĥanika *robot*muzikisto[1], kiu nun funkcias en la aliaj teatroj k kinoj.

* * *

"Ameriko Venkas Brition" enhavas pli ol 400 paĝojn por pruvi, laŭ la vidpunkto de la bone informita verkisto L. Deni (*Ludwell Denny*), ke Usono progresas rapide al triumfo en konkuro ekonomia kontraŭ ĝia ĉefa konkuranto. Certe la reganta klaso de Usono ĝuas bonan pozicion. La areo de Usono sur la mondsurfaco estas nur 7%; ĝia loĝantaro estas 6% el la mondtuto. Sed Usono produktas:

39% de la karbo
35% de la hidro-elektra forto
71% de la oleo
60% de la tritiko k kotono
55% de la ligno
38% de la plumbo k fosfatoj
50% de la kupro, ferŝtalo
100% de la natura brulgaso

en la mondo. Simile Usono konsumas el la mondtuto:

42% el la fero
47% el la kupro
69% el la kruda oleo (petrolo)
56% el la kruda kupro
36% el la karbo
53% el la stano
48% el la kafo
21% el la sukero
72% el la silko
80% (k pli) el la aŭtoj.

Paradokse multaj usonaj laboristoj suferas malsaton k loĝas mizere. Kaj eĉ tiu ĉi riĉa lando devas enporti almenaŭ 30 materialojn por la industrio. Plue la kapitalistoj serĉas ĉiam k ĉie novan vendejon por siaj varoj . . .

488.

[1] *Robot* = maŝinhomo.

KOREKTO. Bonvolu legi en la lasta frazo de la dua alineo de artik. "Anarkismo pri Sennaciismo" (p. 420) "pri tia *pli malpli* nebula aspiro" (la vorto "pli" mankis).

Ne en formo de antaŭajn konojn postulanta, filozofajn studojn kondiĉanta librego, sed kiel kompilaĵo el kelkaj trafaj studoj de Marks-anoj estas prezentita al vi

KARL MARKS
LIA VIVO — LIA VERKO

en oportuna broŝuro eldonita de SAT.

Kun lia portreto. 88 pĝ. Form. 11×14 (Bibl. de Sennaciulo.) Prezo: 0,60 mk. g.

Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

LA EVOLUO SEN DIO

(Fino. Vidu n-ojn 293/98.)

La dogmo pri dio

De kie venis la ideo, ke ekzistas iu dio? Iu diris al vi, ke li ekzistas. Nek la racio nek la sperto iam kondukis personon al la teismo (dikredo). La pastroj scias, ke ĉiu infano naskiĝas ateista. Tial ilia insisto koncerne la religian edukadon.

La pastroj asertas, ke dio ekzistas, ĉar la kredo je lia ekzisto estas larĝe k malproksimen disvastigita. La kredo je sorĉistoj, feoj, demonoj estis ankoraŭ pli ĝenerala. Tiu ĉi argumento elmontras la spiritan kalibron de l' pastraro.

Ne ekzistas faktoj, kiuj permesas fabriki koncepton pri dio. Oni lin priskribas ĉiam negative — sen korpo, sen organoj, sen pasioj ktp. — "Senfina persono" estas tiel neperceptebla kiel "kvadrata rondo" aŭ "vertebrulo gasa", difino kiun Hekel *(Haeckel)* donis pri la diaĵo.

La pastroj parolas multe pri la Unua Granda Kaŭzo. Kaj la Lasta Granda Efiko? Ĉu oni same devas kredi pri ĝi je minaco de inferpuno?

La hinduismano diras: "Ĉiu afero devas havi subtenilon. La tero ripozas sur la dorso de elefanto, kiu ripozas sur la dorso de testudo." Kaj tie li ekhaltas. La kristano diras: "Ĉiu afero devas havi kaŭzon." Kaj li rilatigas ĝin al dio. Bela paro, efektive!

Tiu ĉi erara rezonado devenas de erara ideo pri la naturo de l' kaŭzo, kiu estas relativa, ne esenca.

Kiam Napoleono demandis al Laplas (*Laplace*), kial li preterlasis dion en sia verko pri la astronomio, ĉi tiu respondis, ke okazis, ĉar li ne bezonis "tiun ĉi hipotezon".

"Ne ekzistas leĝo sen leĝdonanto." Kaj ne leĝdonanto sen patro. Kiu generis dion?

La sola baro, kiu dividas la sciencon de l' superstiĉo, estas la leĝo de l' logiko, kiu leviĝas kontraŭ la supozo pri supera kaŭzo, dum la ordinaraj kaŭzoj sufiĉas por klarigi la observitajn faktojn.

Ni scias, ke ekzistas natura leĝo. Por kio utilas serĉi pli malproksime? Se dio ekzistas, por kio utilas maltrankviliĝi pri tio en universo regata de la naturaj leĝoj? Malmulte gravas, ĉu dio adoras aŭ ne adoras min. La malo same malmulte gravas.

La hazardo k la natura leĝo direktas ĉe la disdono de manpleno da sablo ĵetita sur la plankon. Ekzistas leĝo pri la probabloj[1]. La eblo devas realiĝi en la senfino de l' ŝancoj.

Dio estas ĝeneraligo de Jupitero, Zeŭso, Jehovo, Balo, ktp. Ĉi tiuj diaĵoj neniam ekzistis. Dio, sekve, estas ne-ento[2] en la dua efiko — abstrakto el nerealoj.

Oni akuzas la ateistojn pro dogmemo, ĉar ili neas la ekziston de iu dio. La di-kreduloj neas, ke pluraj dioj ekzistas. Kial unu estas pli dogmema ol la alia?

La pastroj postulas de la ateistoj pruvi la neekziston de dio, kvazaŭ estus eble liveri alian aferon ol negativajn pruvojn. Kion ili volas: ke ni prezentu dion, ni kiuj lin neas?

Se ateisto asertus, ke ekzistas iu "Ha! Ha!" k respondus, se oni petus de li la pruvon, per tio ke li mem postulus la pruvon pri ĝia ne-ekzisto — ĉu tiu ne estus kompleta frenezulo? — Dio estas "Ha! Ha!" pligrandigita.

Karlo Smith

El la franclingva revuo "L en dehors" tradukis N. B.


[1] Verŝajnoj (en matematiko k filozofio).
[2] Ento = tuto de la ecoj, kiuj konsistigas la esencon de estaĵo. — *Trad.*

TURKSIB

Sub tiu ĉi nomo en Sovetio oni komprenas la ĵus finkonstruitan fervojon en Azia parto de l' Unio. Ĝia plena nomo estas Turkestana-Siberia fervojo. La 25-an de aprilo ĉiuj laboroj por konstruado de tiu fervojo estis finitaj, k 15-an de majo oni komencis ekspluati ĉi tiun grandan relaron. Ĝi komenciĝas ĉe stacio *Aris,* kondukas trans *Alma-Ata,* preter lago Balĥaŝ- Sergiopol- Semipalatinsk k finiĝas ĉe la stacio *Novosibirsk* en Siberio sur longo de 2519 kilometroj. En tre mallonga tempo efektiviĝis la konstruado de tiu fervojlinio; ĝi estis komencita en j. 1928. En 1930 restis finplenumotaj nur 4% el ĉiuj konstru-laboroj. Oni supozis fini la konstruadon ĉe Turksib laŭ kvinjara plano en fino de 1933. Sed pro bona traesploro de l' variant-skemoj en konstrulabora plano, oni malpliigis la templimon ĝis fino de 1931. Kaj eĉ tiu fiksita dato renversiĝis, ĉar dank' al fervoro k kunhelpo de l' tuta laborista klaso sovetia en la kuranta jaro finiĝis la laboroj, kiuj kostis proks. 175 milionojn da rubloj (1 rublo = ½ dol.). Komence eksterlandaj inĝenieroj difinis la elspezosumon je 203,7 milionoj da rubloj, sed oni sukcesis redukti la sumon je la supre citita nombro, k la longega relvojo konstruiĝis spite ĉiuj malhelpoj entute eksterordinaraj, kiel klimataj, topografiaj k ĝenerale ligitaj al la kondiĉoj de tiu regiono. La plej grava rezulto de ĵus konstruita fervojo estis ekstarigo de regula transport-provizado per multaj nutraĵproduktoj al k el la lando, k precipe importo de malkara greno el proksimaj grenriĉaj regionoj kiel Siberio, Kazakstano, Kirgizio ktp. Laŭ kvinjara plano la importo de greno en Azion atingos dum 1930—33 pli ol 835 400 milkilogramojn. Ankaŭ gravan signifon havas eksporto de kotonaĵoj k diversaj produkt-provizoj por teksindustrio de Sovetio, kiu tiele liberigas sin de influoj de eksterlanda merkato. La sekvanta grava rezulto estas tiu de l' lignoeksporto per tiu fervojo el Siberio al eksterlando k same por siaj propraj bezonoj en Mez-Azio, kiu estas tre malriĉa en tiu rilato. Krom tio la Turksib-fervojo ludos precipe gravan rolon por potenca disvolviĝo kiel en kultura, tiel same en ekonomia rilato.

La grandaj terspacoj de Mezazio vidos intensan kulturadon de kotono anstataŭ graminacoj kiel greno, rizo ktp. Siberio, tre riĉa grenujo, plena je lignaro, ankaŭ kampar-mastrumaj produktoj, provizos grandkvante Mezazion per siaj produktoj. Grandan lokon okupas eksporto de ligno-masivoj k disvolvo de ligna industrio. Baldaŭa konstruado de metalurgia fabriko apud Telbes k maŝinkonstruaj fabrikoj, ankaŭ rezultigos riĉan k fruktodonan utilon por tuta Sovetio k aparte por Mezazio. Oni preparas ankaŭ diversajn helpvojojn por transporto de provizaĵoj en Siberia lando.

Kazakstano k Kirgizio estas regionoj kun miksita tipo de kampara mastrumado, grandaj perspektivoj



rilate al bredo de brutaro. Ĉi tie kampara mastrumado havas grandan agado-sferon, oni atentas precipe pri kulturado de graminacoj sur grundo kun artefarita akvoprovizo per diversaj kanal-kondukejoj. Pri kulturado de teknikaj (? Red.) plantaĵoj oni ankaŭ atentas, kiel kanabo, rizo, tabako, beto k. s. En ĉiuj teritorioj limantaj al la Turksib-fervojo, ekzistas grandaj provizoj por disvolvo de minindustrio k precipe prilaborado de hejtmaterialo k kolora metalurgio. Tie ekzistas plej riĉaj provizejoj de kolormetaloj, ekz. Altaj-montaro, Ridder, Norda Balĥaŝ, ĉe Aleksandra montĉeno k ĉe limo de okcidenta Ĉinio, ktp. Ekzistas ankaŭ karbminejoj kiel Karagandin, Ekibastus ktp., enhavantaj pli ol 10 miliardojn da milkilogr. da karbo. Jen pli malpli gravaj karakterlinioj pri la granda signifo de l' konstruita Turksib-fervojo.

Kompiltrad. *V. St. Fedorovski (13 059).*

T u r k s i b ankaŭ estis eluzata por la film-propagando kiel ĉiuj gravaj objektoj en sovetia vivo. K-do F. S., Vieno, konigas en sekvantaj linioj siajn impresojn pri tiu filmo, artverko, servanta interesi larĝajn amasojn pri tiu teknika progreso. — R e d.

La filmo pri la konstruado de l' fervojo "Turksib" estas verkita de la reĝisoro *W. A. Turin.* Kiel aliaj sovetiaj filmoj ankaŭ tiu prezentiĝas sen profesiaj geaktoroj, sed montras precipe la homan *laboron;* tamen aŭ ĝuste *tial* ĝi pli ekscite efikas ol iu komplike elpensita dramo.

La unuaj bildoj: Vastaj, sekaj kampoj en la dezerta Turkestano, kie la tempo dum jarcentoj haltadis. La riĉaĵoj de la lando estus ŝafa lano k kotono, sed por la lasta mankas la akvo, kiun oni bezonas por la greno. Sub arda sunbrilego la homoj sopire atendas malsekaĵon, atendas, atendadas ... Maldensaj vualnuboj supre preterpasas, sed ne donas pluvon al la akvoavida tero. Intertempe sur malproksimaj altmontoj degelas neĝo, fluas riveretoj de la glaciejoj valen, pligrandiĝas tie k fine post longa migrado atingas la sekiĝintajn kanalojn en Turkestano. Kvazaŭ kiel sankta fluaĵo la akvo aperas tie, vivigas la homojn, nutras la kampojn k alportas feliĉon. Sed la akvo nur sufiĉas por la greno, la kotono ne povas kreski. Kaj tiu kotono *necesus* por provizi la tutan Sovetion. Se oni produktus la kotonon, mankus la greno; de kie tiukaze preni ĝin?

En Siberio troviĝus greno, pli multe ol estas konsumata. Siberio povus eksporti grenon al Turkestano k tiel ebligi tie la nuran produktadon de kotono je utilo de la tuta regno. Sed — ekzistas granda *Sed:* nenia fervojo kunligas ambaŭ landojn. 1500 kilometroj sen reloj! Nur kamelaj karavanoj trairas la dezerton, dum premanta varmego k ofte dum sabla ventego. Por interŝanĝi la produktojn oni devas superi la distancon per konstruota fervojo.

Aperas la unuaj senditoj de la kulturo en la stepo, la topografistoj. Timeme la indiĝenoj rigardas ilian aŭtomobilon, kiel "veturilon de la diablo". Sekvas laboristoj, fosantaj k hakantaj, portantaj relŝtipojn. En la urbo amasiĝas la materialo: radoj, aksoj, bufroj, ligno, vinktoj, ŝraŭboj, vagonoj. Inĝenieroj k oficistoj projektas, desegnas, kalkulas. Per la maŝino la homo enpenetras la dezerton. Febre laboras dragiloj[1] k turngruoj. Milito kontraŭ la primitivo! Triumfo de la tekniko!

Certe ne forrestas malhelpoj. Rokoj baras la vojon. La naturo obstinas. En Siberio dum temperaturo de — 42° ĉio glaciiĝas k la laboro ĉe la pontoj prokrastiĝas. Sed la homo estas eĉ pli obstina ol naturaj fortoj. Neĉagrenite ĝi daŭrigas la konstruadon, de sudo al nordo, de nordo al sudo. Oni *devas* venki ĉiujn malfacilojn. Per dinamito oni krevigas ŝtonajn murojn. La fera buŝego de la dragilo mallace englutas teron k elkraĉas ĝin apuden. Kamelo venas unuafoje al la reloj. Jam prove veturas lokomotivo k nomadoj alrajdas de malproksime por admiri la miraklon. Eksonas fajfo, la maŝino ekmoviĝas k la stepanoj naive volas fari vetkuradon sur siaj ĉevaloj k kameloj ...

Tiu "filmeposo de konkero" estis

[1] Sablo-forigiloj.

TAGO EL MIA VIVO

1. Pri mi

Mi estas oficisto: sekretario en administracia fako de Ivanovo-Voznesenska gubernio. Mia familio konsistas el mi, edzino k tri infanoj (knabinetoj); krom tio ĉe mi loĝas fratino surdmuta (ŝi estas lernantino en lernejo por surdmutuloj). Miaj filinetoj ankoraŭ estas tre junaj, la plej aĝa havas naŭ jarojn. Ŝi jam vizitas lernejon de l' unua ŝtupo k estas pionirino. Mia loĝejo konsistas el du ĉambroj de 46,11² m. Krom kuirejo k koridoro la domo, en kiu mi loĝas, estas komunumigita; ĝi apartenas al fabrikestro sinjoro "Gandurin". Mi estas depost ses monatoj ruĝa komandanto, servis en la ruĝa armeo 9½ jarojn, estis ĉe pluraj frontoj, batalis kontraŭ blankaj generaloj k nun mi ekestis malsana (mia koro malfortiĝis).



2. Pri mia labortago

Mi ellitiĝas post la sepa horo matene, k post lavado k matenmanĝo konsistanta el du glasoj da teo kun lakto k unu glaso da lakto kun du blankpanaj bulkoj, mi legas ricevitajn gazetojn. Post la 8.45 h. mi iras al mia oficejo k eniras mian kabineton je la 9-a h. Tie mi trarigardas paperojn por prilaborado k disdonas ilin al afergvidantoj k maŝinskribstinoj. Poste mi diktas laboraĵojn al maŝinskribistinoj de mia estro. Per tiuj aferoj forpasas miaj tagoj. Longdaŭra labortago estas de 9-a horo ĝis 15,30 h. kun interrompo duonhora por tagmanĝo.

3. Post laboro

Je 15.45 h. mi jam estas hejme k manĝas fiŝbrasikosupon aŭ fungosupon, aŭ laktosupon k fritfiŝon aŭ terpomojn kun bovoleo aŭ poligonkaĉon, ankaŭ kun oleo. Mi ne manĝas viandon ĉar mi estas kormalsana, sed miaj familianoj manĝas tian. Post vespermanĝo mi ripozas unu horon, aŭskultas radion (mi havas laŭtparolilon), ludas kun miaj infanoj (ili parolas kelkajn vortojn en esperanto), finlegas poste ĵurnalojn: mi abonas kvar gazetojn k ses aliajn ĵurnalojn, inter kiuj "S-ulo", "LNE", Bulteno k Informilo de SEU. De 18-a ĝis 20-a horo mi iras en iuj tagoj al partia kunveno, en aliaj mi instruas esperanton. Krome mi estas prezidanto de "Oso-aviaĥim"-ĉelo, libervola asocio por defendo de sovetlanda kemio k aviado.

4. Festotagoj

Kiel fotoamatoro mi iradas kun la aparato en ĉirkaŭon de nia urbo por fotado. Preparinte el malnovaj negativoj la fotojn, mi dissendas ilin al miaj eksterlandaj korespondantoj. Ĉar mi jam fotadas 14 jarojn, mi havas dek tri albumojn k du cent fotoplatojn. Vespere mi vizitas kun la edzino la urban teatron, prefere operon k koncertojn, iam mi iras al kino. Ofte mi de 20-a ĝis 23-a h. aŭskultas en mia hejmo la plej bonajn radiokoncertojn el Moskvo. Ankaŭ mi skribas de tempo al tempo al miaj eksterlandaj amikoj aŭ legas esperantan literaturon. Je la 23-a aŭ 24-a horo mi jam enlitiĝas. Mi dormas 7 ĝis 8 horojn, laboras en oficejo 6 horojn k 4—5 horojn por la socio, k 6 horojn mi laboras por mi k ripozas. Tiel pasas mia tago.

Semjon Isajev, Sovetio.

---

farita tute hazarde, sen antaŭa plano, sen ia ajn fotografeja sceno, nur laŭ la pasado de l' okazaĵoj. Ĝi instruas pri la novaj metodoj de revolucia filmarto k vere entuziasmigas ĉiun, kiu vidas ĝin.

F. S., Vieno.

DISKUTEJO

Respondo je la skribaĉo de SAT-ano 7599 (A. G.)

Estas ĉiam pli bone valori kiel malgranda fanatikulo ol kiel grandega egoisto, tio ĉi estas mia opinio, K-do Graller! Mi estas tre fiera, esti kompartiano, ĉar mi ne havas du ĝis tri flankojn politikajn kiel vi. Estas ridinda pro persona disputo misuzi nian gazeton. Tio montras al ĉiuj vian veran vizaĝon. Mi ne tro honoras personojn (ekz. K-don Lanti), sed nur la tutan esp. movadon. Mi volas demandi vin, ĉu ankaŭ estas fanatiko, se ni rekonstruadas tion, kion vi disrompis. Pripensu! Mi ŝatas sincerecon k klaran konvinkon politikan!

SAT-ano W. Weihrich (15 413.)

Respondo pri fanatiko

El la citita unu respondo de l' kompartia SAT-K-do mi ne povas eltiri, ke li estas fanatika. Li nur diris, ke K-do Lanti ne estas komunisto[1] (kompartiano?) k (tial?) li nenion de ĉi tiu legos. Nu, eble, ke li jam bone konas K-don Lanti k tute ne plu bezonas la legadon. Ankaŭ verŝajne li ne sufiĉe pripensis la kaŭzon de nelegado k la respond-vortojn, ĉar L. verkis "For la neŭtralismon" estante kompartiano. Eble li legus do Lanti-ajn verkojn el tempo de lia kompartianeco. Sed temas pri hodiaŭa stato.

La partieco aŭ partianiĝo de verkanto povas esti kialo de nelegado. Se mi bone k sufiĉe konas iun ajn partion aŭ grupon, mi rifuzos legi ion de koncerna partiano, ne volante malŝpari tempon k forton. Ĝeneralan starpunkton, ke kompartiano ne legu nekompartiajn skribaĵojn, mi en la vortoj de l' K-do ne trovas. Certe ĝi ankaŭ ne ekzistas, ĉar aliel kompartianoj ne havus permeson legi "S-ulo"n, eĉ komunistajn gazetojn. Estas propra afero de kompartia SAT-K-do legi aŭ nelegi, k li mem diru al ni, se temas pri ĝenerala vidpunkto, la kialon de l' rifuzo.

MOR (14 624).

[1] Estas ja vere, ke mi ne pagis kotizojn al la Francia Kompartio jam komence de la jaro 1928 k sekve ne plu estas kompartiano. Sed prave aŭ malprave mi opinias, ke en la nuna francia kompartio estas malmultaj veraj komunistoj — k multaj ekster . . . E. L.

POR NIA DISTRO



Aŭtografoj

— Ĉu vi estas certa, ke tio estas de Napoleono?

— Malfacile certigebla, tial ke ĝi estas maŝinskribita.

Pro la religio!

Lastatempe ĉe publika kunveno (raportas la "Ĉiutaga Heroldo" — *Daily Herald*) la lernejestro de unu el la altklasaj gimnazioj en Anglio diris, ke la dimanĉaj lernejoj religiaj naskiĝis nur pro tio, ke la gepatroj laŭ sia kutimo volas dormi dimanĉe posttagmeze. — Tre inda motivo! Sed ĉe la infanoj k dio, ĉu tio estas akceptinda?

2800



Ĉu vi jam pagis vian kotizon por la jaro 1930? Se ne, tuj faru tion!

Esperanto-Servo

N-o 39 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 26. Junio 1930

EL USONO

Negroj k blankuloj komune batalu

267 (Esp.-Servo.) Laŭ ordono de sud-usonaj kapitalistoj okazis domtraserĉo dum la Amerika Negro-Laborist-Kongreso. Estis arestataj 6 K-doj — organizantoj de la Negrokongreso. La reganta klaso tremas, timante ĝi observas la plivastiĝon de kom. partio k de la senlaborula organo "TUUL". Oni serĉas pretekston por legale mortigi revolucian movadon k teni gvidantojn dum jaroj en karcero. Ja por ili estas speciale "malagrable", ke blankhaŭtuloj intencas organizi "malpurajn" negrojn k la ribelemajn senlaborulojn. — En urbo Oakdale polico meze de majo grave vundis la negro-laboriston Herbert Robertson. La polico kun granda "linĉ"-amaso serĉis negron nomitan Mobilen, kiu laŭdire la policon ofendis. Ĉar oni ne trovis lin, oni simple venĝis sin ĉe alia negro pro la "malhonesta" ofendo kontraŭ la blanka raso... — Alia negro devis servi kiel celaĵo, ĉar li "suspekte kondutis sin". En sama semajno okazis ankoraŭ tri aliaj similaj "linĉoj". — En Sherman blankuloj atakis negrojn k ekbruligis ankaŭ domojn de negroj. Estiĝis tumulto, policistoj ĝentile intencis retiri la blankulojn. Sed kiam blankaj laboristoj iris surstraten k postulis panon aŭ laboron, policistoj sam-malĝentile batis ilin kiel negrojn. — Batado de negroj — k de blankuloj ribelemaj — neniam malaperos, se la laboristoj ne mem forpelos la kapitalistan klason. Kaj tio efektiviĝos nur ti-kiam negroj k blankuloj, ti-kiam ĉiu-rasaj subprematoj komune batalas. En Usono iom post iom tiu komuna batalfronto formiĝas, same okazu tio en ĉiuj kapitalistaj regionoj — k ni venkos...!

13 286.

Denove negro mortigita en Texas

268 (Esp.-Servo.) Ne ankoraŭ pasis unu semajno de la lasta negromortigo en Sherman (Texas), k jam denove fimortigis burĝoj-faŝistoj negron, nomitan Sam Johnson. Oni akuzis lin je mortigo de blanka farmisto. La negro en sia loĝejo estis atakita de ĉ. 500-persona "linĉ"-amaso, kiu per pafiloj kripligis lin. Poste la linĉantoj ĉenis lin k tiris la duon-kadavron tra stratojn ĝis urblimo, kie ili pendigis la negron sur arbon k ekbruligis fajron sub li. Tio okazis en urbo Honey Grove, kiu situas ne tre malproksime de urbo Sherman, kie do laŭ onidiroj armeo gardas pacon k ordon... — Eŭropaj laboristoj akceptantaj eble la raporton kiel fabelo, sciu, ke en Usono negro ne estas konsiderata kiel homo; ekz. li ankaŭ ne rajtas eniri tramon en kiu estas blankuloj. Foje mi laboris dum du monatoj en lado-fabriko en Sparrows Point, Maryland. En tiu fabriko laboras multaj negroj. Ili ricevas tre malaltan salajron k havas loĝejojn en speciala parto de la urbeto. En la fabriko super la pordoj de necesejo k lavejo estas skribite: "nur por blankuloj" aŭ "nur por negroj". Mi estis foje en urbeto Turner. Tie tramvojo disigis la urbeton en du partoj; sur unu parto loĝas blankuloj, sur alia negroj. Komence ili loĝis miksite, k ofte okazis sangaj bataloj inter la du rasoj.

Ankaŭ en somero

la klasbataloj de la proletaro ne ĉesiĝas k eĉ ne interrompiĝas. Sed ŝajne en kelkaj "trankvilaj" k "blankaj" regionoj *niaj* Gek-doj ĉesas kunlaboradon ĉe Esperanto-Servo, dume usonaj K-doj des pli amplekse sendas gazetservan materialon. Konsciu pri via devo k

sendu raportojn!

Foje la Ruĝa Helpo havis kunvenon tutlandan (en alia urbo) k la delegitoj eniris hotelon; sed la hotelestro elĵetis la negrojn. Eksciiĝinte pri tiu fiago la aliaj delegitoj tuj forlasis la hotelon k sekvanttage amase manifestaciis antaŭ tiu hotelo. — La malamikecon inter la du rasoj provokas sole la kapitalistoj, ĉar ili en tio sentas ankoraŭ sian forton. Plej bedaŭrinda fakto estas, ke en Usono eĉ ekzistas lab. organizoj, kiuj malpermesas al negroj aliĝon. *Nagy, Novjorko.*

Negroj tuj forlasu la urbon!

269 (Esp.-Servo.) La "Klu Klux Klan" (faŝistoj) disvastigis en urbo Sherman (Texas) alvokojn, per kiuj ili avertas la negrojn k postulas, ke la lastaj tuj forlasu la urbon, se ili deziras plu vivi. La urba estraro kompreneble subtenas fiulojn malamantajn la negrojn.

L. Nagy, Novjorko.

EL GERMANIO

Faŝistoj kontraŭ respublikanoj

270 (Esp.-Servo.) En Nord-Germanio, proksime de Stettin, uniformitaj naci-socialistoj (faŝistoj) surpriz-atakis taĉmenton de la respublika ŝirmligo "Reichsbanner" (Rajĥsbaner) k senindulge batis per siaj mortigiloj al la atakitoj. 14 anoj de la respublika ŝirmligo estis, parte tre grave, vunditaj. La polico trankvile observis la interbatadon k nur respondis al demando, kial ili ne faras sian devon, ke ilin la malpermeso de la faŝista uniformo ne jam atingis sur oficvojo! Ĉu germana polico estas alia ol en "ne-demokrataj" landoj?... *O. B*

Antaŭbalota "agitado" en Saksio
Faŝistoj mortbatis antifaŝiston

271 (Esp.-Servo.) Dum antaŭbalota agitado por la saksia parlamento, la 15-an de junio okazis en proksimo de Leipzig sanga batalado inter faŝistoj (t. n. "naci-socialistoj") k anti-faŝistoj. Sub gvidado de Leipziga urb-deputito Kerĥel faŝistoj en sepobla plimultnombro, alvenintaj de diversaj flankoj per ŝarĝaŭtomobiloj, sieĝis urbeton Eythra, en kiu dum tiu tempo antifaŝistoj kune kun junkomunistoj k kompartianoj agitadis por siaj kandidatoj k aranĝis kelkajn surstratajn balot-kunvenojn. Subite la faŝistoj ekĵetis ŝtonojn k batis surprizitajn antifaŝistojn per latoj, bastonegoj, "mort-batiloj", k eĉ uzis ponardojn. Okazis do vera surstrata buĉado, kiu daŭris preskaŭ tutan horon. Ĉe muro de la tombejo faŝistoj sukcesis izoligi malgrandan aron de antifaŝistoj, k ili plej kruele uzis tiun "favoran" momenton k fimortbatis unu K-don de la antifaŝista jungvardio; multaj aliaj K-doj estis pli malpli grave vundataj. — Similaj atakoj flanke de faŝistoj okazis ankaŭ en aliaj lokoj en Saksio, kio klare montras la nunan staton en nia "libera" respubliko. Kompreneble la faŝistoj estas senkulpaj, kion sekvantan tagon ja atestis la tuta faŝistema gazetaro. Certe la faŝismo, kuraĝigita pro sinteno de gazetaro faŝistema k kvazaŭ protektata de "niaj" regnaj institucioj — registaro, justeco, polico ktp., konstante pli impertinentiĝas. Sed ni konscias pri niaj taskoj k estas konvinkaj, ke la finvenko estos nia. Kuraĝe ni daŭrigu la batalon k vastigu niajn klasbatalajn vicojn en Saksio, en Germanio, en tuta mondo. *Antifaŝisto.*

EL SOVETIO

Porradia Esperanto-Servo

272 (Esp. - Servo.) La Radio - Sendstacio en Odessa regule utiligas la raportojn de Esperanto-Servo k deziras sur plej rapida vojo ricevi raportojn pri okazintaĵoj en tuta mondo. Estas dezirite, sendi ĉiam ankaŭ kopion de raportoj por Esperanto-Servo, laŭ adreso: Odessa Radjo-Centro de la popola komisario de poŝtio k telegrafio, Lenina str. 17, Odessa, Sovetunio. *N. Ĥolm*

RESPONDA PARTO

15 973. La poeziaĵon mi konservas, ĉar ne uzebla por ĉi tiu paĝo; sed certe ĝi iam aperos en ĵurnalo.

13 827. Senprokraste ekspedu raportojn, ĉar lastaj bedaŭrinde malaktualiĝis. Verku malpli, sed sendu plej rapide.

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 27 Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio) N-o 27

ANTAŬ LA X-a

Proksimiĝas la X-a. Ankoraŭ unu jaro forpasis. Kiujn sukcesojn ni atingis? Unua grava atingo — regula aperado de nia Paĝo, dua — partopreno en la organizado de ISIS, tria — fondo de Internacia Laborista Universitato, kvara — praktika apliko de esperanto por kulturaj interrilatoj. Sed ni havas ankaŭ mankojn! Ni ne sukcesis bone aranĝi nian organizan laboron, niaj konsuloj tre ofte k tre multaj dum tuta jaro ne skribis eĉ unu vorton nek faris ion por la Sekcio. Ni bezonas laboremajn K-dojn k de ĉiu sekciano ni postulas etan laboron por la Sekcio. Ni ne sukcesis formi grupon el SAT-medicinistoj, ĉar tiuj lastaj ne volas informi pri si nek volas labori en la Sekcio.

Ni ne sukcesis kolekti materialon por nia Scienca Krestomatio . . . ni ankoraŭ multon ne sukcesis fari. Antaŭ la X-a ni kritiku nian laboron k montru la vojon por korekto de niaj mankoj. Do, sekcianoj k ĉiuj SAT-anoj — la parolrajto apartenas al vi!

Nia kunveno dediĉita al priparolo de nia agado estos daŭrigata en sekvonta n-o de nia Paĝo. *D. S.*

FOR TABAKFUMON EL LABOREJOJ!

La opinioj de K-do Anub bedaŭrinde (ĉu intence?) ne tuŝas la ĝeneralajn vidpunktojn de K-do Doks, kiu lasta konsideris la problemon laŭ publika intereso, dum la unua nur substrekis personajn motivojn. Komprenehle neniu deziras malpligrandigi la "liberecon" de fumantoj k la malutilo al la organismo per fumado ŝajnas ja kiel privata afero de la koncerna persono. Sed tiu privateco ĉesas, se la agado (fumi) malfavore influas la sanecan staton de aliaj homoj, ekz. de la idaro, kiel K-do Doks mencias. Sciencaj esploroj pruvis, ke la tabaka fumo ne nur malsanige efikas al la fumanto, sed ankaŭ al tiu, kiu *hazarde enspiras ĝin*. Do la plezuro de fumantoj signifas malutilon por nefumantoj; tio estas precipe grava en laborejoj k oficejoj, kie multaj homoj komune deĵoras. La fumo enpenetras la vestaĵojn ankaŭ de nefumantoj k abomene odorigas eĉ la tolaĵon. Ĉe la fer- k tramvojoj ekzistas apartaj vagonoj por fumantoj k nefumantoj: ĉu tio ne montras, ke la fumado ne estas agrabla por tiuj, kiuj ne partoprenas ĝin? Gastejojn, kafejojn k aliajn lokojn, kie oni kutime fumas, la nefumanto povas eviti, sed labori li devas k tial li pasigas ĉiutage 8 horojn en tabakfuma haladzo, kvankam tio malutilas al la sano. Laboristoj ja estas iom ŝirmataj kontraŭ tiaj cirkonstancoj, ĉar en la plej multaj fabrikoj pro fajrodanĝero estas malpermesata fumi. Sed en oficejoj la situacio estas alia. Ĉar la fumado k enspirado de fumo malpligrandigas la laborkapablon, oni povas demandi, ĉu la fumantoj *rajtas* tiele agi kontraŭ nefumantaj kunlaborantoj. Kiel oni pensas pri tio en la lando de la socialisma konkurado, en Sovetio?

La homa socio tute pravas, defendi sin kontraŭ atakoj de popolaj venenoj, malhelpante la uzadon de alkoholo, tabako aŭ opio. Ne gravas, kiu veneno estas la plej akra; ni juĝu laŭfakte, ne laŭgrade. Kaj ni severe diferencu inter aferoj de solaj individuoj k tiuj de la tuta socio. La klaso, kiu konkeros la mondon, ne povas toleri malplifortigon de l' popola korpo, kies plej valoran havaĵon reprezentas la sano. *F. S., Vieno.*

P. S. — En multaj sovetiaj laborejoj (fabrikoj k oficejoj) oni malpermesas fumi. Nun en ĉiuj novaj konstruoj de fabrikoj, kino ktp. oni speciale konstruas ĉambrojn por fumado. Laŭ esploro de kuracisto, tabako pli influas je tiu homo, kiu ĝin ne fumas. Pri tio, kiel influas fumado je laborkapablo de loĝantaro, ni rakontos en speciala artikolo. — D. S.

LA RUSAJ FILMOJ EN EKSTERLANDO

Kiam antaŭ kelkaj jaroj aperis la rusaj filmoj, ili tuj kaŭzis tiel entuziasman konsenton kiel ankaŭ pasian rifuzon, sed ĉiuokaze treegan sensacion. Signifis ja ili tutan renverson, veran turnpunkton en la filmproduktado, eĉ en la filmarto. La unuan fojon filmoj pritraktas historiajn k revoluciajn okazintaĵojn, psikologiajn k sociajn problemojn *laŭ la vidpunkto de la proletaro*, dum ĝis nun la burĝaj filmoj, produktitaj ĉefe en Germanio k Usono (Holivud — *Hollywood*) nur reprezentis malgravajn amaferojn ĉiam per fianĉiĝkiso finantajn, aŭ "sendanĝerajn" temojn, sed tute evitis vivoverajn motivojn aŭ ilin tuŝis en mensogema maniero. Iomete kontentigas eble la humoraĵaj filmoj, sed la t. n. filmaj "dramoj" tute fuŝe efikas k ne rilatas al la laborista publiko. Ĉu filmo, en kiu nobla nobelo post diversaj malhelpoj edziĝas kun malriĉa servistino, peras iel ajn ion valoran al proleto? Kompreneble la suprencelanta klaso deziras ankaŭ en la filmarto trovi respeguliĝon de sia propra vivo, de sia laboro k lukto por la estonto. Tiun postulon plenumas la rusaj filmoj, ĉu en la revolucia ideo de la "Dek tagoj, kiuj skuis la mondon", ĉu en la historia enhavo de "La sanga dimanĉo", ĉu en la sociaj k moralaj temoj de la filmoj "Maŝinisto Uĥtomski", "Inter lito k sofo" ktp.

Mi ne vidis ĉiujn rusajn filmojn tiajn en eksterlando montritajn, sed jam la malmultaj sufiĉas por ekkoni la avantaĝan distingon de la rusaj artaĵoj kompare al la ordinaraj produktoj. Facile konstateble, ke la kapitalisma filmproduktado la filmon ne uzas por popolklerigo, ne por sciodisvastigo, sed kiel stultigrimedon, plejbonokaze kiel amuziĝilon, dum la rusaj filmoj aludas k ekzamenas homajn problemojn.

Rigardu ni unue la verŝajne plej multe konatan filmon "Kirasŝipo Potemkin". Kiu ĉeestis prezentadon de tiu filmo, tiu certe ne povas forgesi ĝin. Kiu travivis la militon kiel soldato, komprenegas la situacion, kiam la maristoj ribelas pro la viando enhavanta larvojn, kiam la kuracisto deklaras, ke la viando ja estas manĝebla, ĉar la larvoj "nur" devenas de muŝoj, kiam la komandanto ordonas mortpafi ĉiun dekan el la ŝipanaro. Kaj la scenoj, kiam la infanteria trupo paŝon post paŝo malsuprenmarŝas la ŝtuparon de la "Bulvardo Feldmann" en Odeso, kiam la maristoj okupas la militŝipon k sidas sur la kanonoj, sur la ferdeko, triumfante svingante standardojn k tukojn — kiel trafe skizitaj! La publiko ekĝojegis kun la ribelantoj, vokis, kriis, hurais, *kunvivis* — la orkestro ekludas la Marsejez-on, kia grandioza efiko! Kiu alia filmo povus imiti tion?

Antaŭ la lastaj parlamentaj elektoj en Aŭstrio en 1927 la socialdemokrata partio uzis la filmon "Potemkin" kiel propagandilon. Oni prezentis ĝin sur grandaj placoj en Vieno "sub libera ĉielo" (plenaere), kompreneble tute senpage. Ĉiam staris amaso da homoj sur tiuj placoj k ĉiuj stratpasantoj vidis la filmon preterirante. Tiel oni ankaŭ ekkaptis tiujn, kiuj aliel ne estus vidintaj rusan filmon. Sendube "Potemkin" havis menciindan influon je la progreso de la socialdemokratoj ĉe la baloto.

Bonega ankaŭ estas "La fino de Sankta Peterburgo (Petrogrado)", precipe la bildoj, kiam grupo da soldatoj ekmalobeas k generalo, post kiam Kerenski vane klopodis delogi ilin, ordonas al kelkaj infanterianoj ekpafi. Jam la soldatoj levas la pafilojn, celas — oni atendas ĉiumomente la sangan teruron de la pafoj . . ., sed la soldatoj subite sin turnas k direktas la pafil-

TRA ESPERANTIO

POR LA DUA TRAKTORO

(Okaze nia 10-jara esperantisteco)

Multaj legantoj sendube rimarkos, ke tiu ĉi longa artikolo entenas multan balaston, kiu devus je ĵurnalistika vidpunkto, esti forstrekita. Tamen tion ni ne faris, tial ke la aŭtoroj ***postulis***, *ke la artikolo aperu sen ia mallongigo. Ne volante liveri pretekston, sendube serĉatan, por ke oni denove akuzu nin pri novaj "krimoj". ni do publikigas entute la artikolon, petante pardonon al niaj legantoj k lasante al ili zorgon decidi, ĉu estus ebla al ia ajn Redakcio de gazeto taŭge labori, se multaj kunlaborantoj estus same postulemaj kiel Gek-doj Batta.* *Red.*

Ni opinias, ke la bona organiziteco de certaj aferoj signifas duonan efektivigon ĝian. Tiel ni proponas, ke ĉiuj SAT- k LEA-anoj plej larĝe pridiskutu la ĉi subajn aferojn.

Laŭ la "Bulteno de CK SEU" n-o 1—2 ni konstatis, ke por la aĉeto de unu traktoro estas bezonata la sumo de 1,500 rubloj (2 rubloj = 1 Dolaro). Laŭ la diversaj ĝis nun komunikitaj raportoj, pri la traktorafero, en "S-ulo" k "Bulteno de CK SEU" oni jam kolektis en Sovetio 659 rubl. (marto 1930) Novjorkanoj 76 dolarojn = 152 rubl. Ĉe la FEO-Kongreso 105 fr. frk. = 10 rubl. En Leipzig ĝis nun estas kolektitaj 40 rubloj k certe estas ankoraŭ sumoj kolektitaj, sed ne jam publikigitaj. Same ni legas, ke la Moskva Landkomitato de SEU, mem intencas kolekti 500 rublojn por la traktoro "Laborista Esperantisto". Do la sumo por nia unua traktoro ĵus tiam estos kune, kiam la kolektado en ekster Sovetiaj urboj k ekster Novjorko estas ekfunkciinta.

Sekve ni *proponas,* ke ni ekster-sovetiaj SAT- k LEA-anoj daŭrigu la kolektadon por la dua traktoro. Ni ja povas konstati, ke ofte pli malfortaj organizoj ol ni kolektas monon por ne unu, sed por pluraj traktoroj. Se ni konsideras ankaŭ tion, ke la kolektita sumo restas ĉe la SAT-administrejo en Leipzig k tiel ni multe helpas por ekvilibri la financan spezon de SAT por la ekster Sovetiaj elspezoj (La traktoro estos aĉetota en Moskvo per la mono enspezita por SAT en Sovetio).

Nature, kiel ĉe la aĉeto de unua traktoro ni helpis al la Sovetiaj Esp-istoj laboristaj, tiel ni povas esperi la subtenon de ili por kolekti la monon por la dua traktoro, ĉar la kolektado en Sovetio ankaŭ ne larĝiĝis k aktiviĝis tiom, kiom laŭ la cirkonstancoj estus estinta ebla.

Sed jen ni precizigas nian *proponon* k petas la Gek-dojn el la tuta mondo laŭtigi (sur la paĝoj de "S-ulo") siajn opiniojn pri ĝi.

Ni proponas:

1. La Direkcio de SAT okupiĝu pri la afero k publikigu sian sintenon en "S-ulo" plej baldaŭ[1].

2. Estu eldonotaj presitaj (aŭ multobligitaj) *"Kolektlisto"-j* numeritaj flanke de SAT. Ĝin ricevu la SAT-perantoj aŭ gvidantoj de LEA-grupoj.

3. Ĉiuj kolektitaj sumoj — laŭvice — estu publikigotaj en speciala rubriko *"Nia traktoro"* aperonta en ĉiu dua n-o de "S-ulo".

4. La inaŭguro de la dua traktoro okazu en Moskvo dum la XI. SAT-Kongreso en la jaro 1931.

5. La nomo de la traktoro estu: *"Proleta Esperanto Korespondanto"*.

6. Ĝi estu donacota al la Kolektiva mastrumado ("Kolĥoz"), *"Vojoj de Lenin"*, en vilaĝo *Saurĉa* (Krimeo ĉe Simferopol), kie nia K-do *E. V. Ivnickij,* la verkinto de la "fantazia" rakonto pri la traktoro "Laborista Esperantisto" laboras.

7. La kolektado komenciĝu tuj k daŭru ĝis la necesa sumo estas kune.

8. La kolektitaj sumoj estu sendotaj al la administrejo de SAT, *R. Lerchner,* Colmstr. 1, *Leipzig O. 27.*

Eble estas K-doj, kiuj ne komprenas niajn proponojn. Eventuale estas, kiuj demandos, ke "kiu decidis pri la okazigo de SAT-Kongreso XI-a en Moskvo?". Certe ĝis nun neniu decidis, sed jam dum la Leipzig-a kongreso, dum nia IX. granda estis la deziro, ke iu el inter la sekvontaj SAT-Kongresoj okazu en la lando de tutmonda proletaro. Jam en Leipzig preskaŭ estis decidita, ke la X-a Kongreso okazu en Moskvo, sed pro diversaj aferoj ĝi estis ne akceptita.

Estas fakto, ke la pli granda parto de ekster-sovetia laborista esp-istaro — SAT k LEA-anaro — sopiras vidi tiun landon k speciale la koron de vastega Sovetio, la citadelon de tutmonda revolucia movado proletara — la ruĝan *Moskvon.* Tial ni faras la proponon jam nun ankaŭ al la kongresanaro de la X-a por, ke ili honoru la deziron de miloj da proletaj esp-istoj — SAT-anoj — akceptante kiel lokon por la XI-a Moskvon.

Niaj Moskv-aj SAT-anoj k la CK de SEU certe ne rifuzos fari la oficialan inviton de la SAT-anaro al Moskvo en la jaro 1931. Same ili havos la eblon aranĝi la necesajn aferojn ĉe la Sovet-Registaro. Tiu ĉi kongreso donos la eblon al centoj da ekster-sovetiaj proletoj vidi k sperti la gigantan laboradon de niaj Sovetiaj Fratoj, la laborantoj-n laŭ "Kvinjara Plano", — la efektivigantojn de la *Marks-Leninaj* ideoj.

La dua dubo eventuale estiĝos ĉe la elekto de la nomo por la traktoro. Sed ni havas la opinion, ke la nomo devas a) karakterizi nian movadon; b) ĝi estu komprenebla sentradŭko. Kaj la nomo *"Proleta Esperanto Korespondanto"* enhavas nian estontan k plej gravan celon, ĉar nur tiam ni sukcesos en niaj celadoj se ĉiuj proletaj esp-istoj fariĝos aktivaj laborantoj-korespondantoj sur la laborkampo de Internacia Laborista-Kamparana Korespondado. Ĉiuj lab. esp-istoj devas helpi ĉi tiun aferon, ni devas zorgi, ke fabriko kun fabriko, organizo kun organizo reciproke korespondadu kolektive.

Same tion ni devas jam fin-fine kompreni, ke la epoko de nia movado estas for, kiam sufiĉis por nia propagando la senfina ripetado de devizoj "Esperanto estas ilo por la laboristaro", "Esperanto estas facila" ktp. Ni mem devas enkonduki ĝin — per praktika laboro — en la laboristan movadon, ni mem devas pruvi per laboroj, ke ĝi estas fakte utila por la proletaro. Ni devas scii, ke la laboristaro, la politikaj partioj laboristaj, la ekonomiaj organizoj, la diversaj institutoj laboristaj akceptas nur tion, kiu pruvis sian utilon, necesecon por la koncerna movado. La plej elokventa, plej ĝusta tia movado estas la Internacia Laborista Kamparana Korespondada movado, kiu kvazaŭ estis kreita por ni proletaj esp-istoj. Do ni pruvu nian kompetenton sur tiu ĉi laborkampo PER aktiva laboro k ne per jam de longe konata teoriado pri niaj laboroj.

La "Kolĥoz", kie nia K-do *Ivnickij* laboras areas 15,947 hektarojn da plugeblaj grundoj, sekve nia traktoro bonege povos pruvi sian utilon por la kolektiva mastrumado en Sovetio.

Por komenci jam nun la kolektadon por la traktoro *"Proleta Esperanto Korespondanto"* ni *"familie"* (kamaradeca familio) donacas 1 dolaron, k ni donas la kontrolan ciferon por kolekti ĝis la 1-a de julio 1931

[1] La fakto, ke ni permesis sur la paĝoj de "S-ulo" larĝan reklamadon pri la afero (vidu n-ojn 284, 286, 291, 292, 298) montras sufiĉe klare nian sintenon; plie, la fakto, ke la Direkcianoj mem mondonacis por la traktoro, maldevigas nin atenti la "proponon" 1 de ĉi tiu proponaro! *Direkcio.*

---

ojn kontraŭ la oficiroj! La burĝa reĝimo disfalas, laboristaj batalionoj venkas, la popolo postulas: "La tutan potencon al la sovetoj!", la Revolucio ekiĝas. Petrogrado ne plu ekzistas . . .

(Daŭrigo sekvos.)

F. S., Vieno.

100 mk. g. (25 dol.). Samtempe ni alvokas por *"Socialisma Konkurado"* la jenajn GE-SAT-LEA-anojn por kolekti la sumon k konkuri kun ni, por la efektivigo de *"Proleta Esperanto Korespondanto":*

Alma-Ata ĉe Turksib. (Sovetio) Ge-SAT-anoj 4797—4796; Ammendorf (Germanio) 13 364, 7046, 2002; Antverpen (Belgio) 13 066; Arĥangelsk (Sovet-Unio) K-do 9682 k sia juna edzino; Barnaŭl (Sovetio) 5448; Batum (Sovetio) 5713; Berlin (Germanio) Ge-SAT-anoj 120—14 989, 2921, Ge-5380—5704, 5848, 483; Döllnitz (Germanio) 13 366; Erivan (Sovetio-Armenio) 4999; Essen (Germanio) 13762, 601, 3414, 4567; Göteborg (Svedio) 2503; Hamburg (Germanio) 12 810, 6709, 14676; Hodonin (Ĉeĥoslovakio) 10 032; Ĥarkov (Sovetio) 1447; Irkutsk (Sovetio) 1897; Iv.-Voznesensk (Sovetio) 3409; Kamenskoje (Sovetio) 6553; Krasnodar (Sovetio) 9361; Kremenĉug (Sovetio) La tuta *Izgur*-familio; Kurgan (Sovetio) 3930; Leipzig (Germanio) 12 649; 12 648, 715, 10 081, 59, 1612, 84, 210, 125, 247 – 4292, 5683—2056, 10 889; Leningrad (Sovetio) 7579, 4726, 1679, 9310; London (Britio) 7472; Minsk (Sovetio) 603; Montevideo (Urugvajo) 13 827 kaj edzino; Moskvo (Sovetio) Ge-SAT-SEU-anoj 1516, 1518; New-Yorko (Usono) 29, 13 835, 10 252, 13 286; Orleans (Francio) Ge-518; Parizo (Francio) 11 135 k Ge-50; Preŝov (Ĉeĥoslovakio) 1014, 1227; Sebastopol (Sovetio) 3632, 1187—1311, 5466; Vladivostok (Sovetio) 1188; Vieno (Aŭstrio) 11 899, 10 452—1795, 8863, 10 281, 11 069, 1349, 2474, 4282, 6843, 8065, 413, 1686, 9262, 6890, 4113, 6967, 8346, 9437.

Same ni alvokas ĉiujn Gek-dojn, kiuj partoprenis niajn esp. kursojn k ĉiujn rev. hungarlingvajn esp-istojn en la tuta mondo.

"Per Socialisma Konkurado —
por la Socialismo — por la
tutmonda SOVET-UNIO!"

Kun SAT-salutoj:

Ge—Batta (SAT-anoj 246 — 633), Leipzig, Germanio.

LA GRANDA DISVASTIĜO DE

PETRO

la kursa lernolibro por laboristoj laŭ la rekta, parola metodo **pruvas nedisputeble ĝian taŭgecon por la instruado**. En la formo de interesa, alloga rakonto kun klasbatala tendenco la komencanto lernas kun plezuro k laŭ modernaj principoj nian lingvon.

64 pĝ.
Prezo: 0,70 mk. g. ADM. DE SAT.

LA PLENA VORTARO DE ESPERANTO

estas finpresita k kuŝas nun ĉe la bindisto. Post 10 tagoj ni komencos la ekspedadon k post malmulte da tempo ĉiuj mendintoj estos ricevintaj la volumon.

Ne ĉiuj tamen. Ni bedaŭrinde devas sciigi al niaj Sovetiaj K-doj, ke ilia tasko estas klopodi, por atingi, ke ilia mono venu en la kason de nia Administranto. Ni ja ne povas sen risko grave danĝerigi la financan bazon de nia Asocio, liverante kvazaŭ senpage niajn varojn. Ni ne dubas, ke laŭcelaj klopodoj sukcesos forigi tiun ĝenon en la normala funkciado de nia organizo. La nuna stato estas ja neniel pravigebla k nur nesufiĉa aŭ neĝusta informo pri SAT ĉe la koncernaj Instancoj en Moskvo povas malhepi, ke la mono ŝuldata al SAT venu en ĝian kason.

25. junio 1930.

DIREKCIO DE SAT.

KOMUNIKO DE LA DIREKCIO

Ni ricevis de la ĝisnuna Direkcimembro, K-do B a r t e l m e s, jenan leteron (datitan de 22. majo 1930); kiun ni opinias necese publikigi:

"Karaj K-doj!

Pripensinte la rezulton de la lasta voĉdonado, publikigitan en n-o 294 de *Sennaciulo*, kiu senigas min k K-don Lerĥner je la rajtoj de aliaj SAT-anoj k faras nin kvazaŭ pariaoj en SAT je jura vidpunkto, mi decidas per jeno deklari mian eksiĝon.

Kompreneble malgraŭ ĉio mi restas preta ĉiel helpi al la bono de SAT, dediĉi al ĝi miajn tutajn fortojn, sed mia kompreno pri digno devigas min rezigni postenon en la Direkcio, ĉar mi ne estas plenrajta kiel la aliaj anoj. Mi bone scias, ke la decido, kiu senrajtigis min, ne okazis laŭ via volo k mi petas, ke vi ne konsideru mian eksiĝon iel ajn kiel signon de protesto kontraŭ vi. Mi celas nur protesti kontraŭ la demagogiaj procedoj, kiuj enŝteliĝas en nia organizo. Kun sennacieca saluto

N. Bartelmes (1768)."

Ni tre bedaŭras tiun decidon de K-do B., kvankam ni bone komprenas lian motivon, k certigas al li ĉe tiu okazo nian plenan simpation k rekonon pri la de li dum la du lastaj jaroj kiel Direkciano plenumita laboro k entute lia laboro farata por nia movado.

Sekve de tiu eksiĝo fariĝis necesa elekto de anstataŭonto. Tiucelan proponon faris la kunveno de Pariza SAT-anaro okazinta je 2. junio 1930, en kiu oni unuanime elektis kiel estontan Direkcianon la malnovan, ĉe franciaj lab. esp-istoj pro sia kunverkado al la franclingva Kurslibro bone konatan SAT-anon K-don J. H a b e r t (55) — en la Jarlibro sub "Sucy". Tiu elekto validos post konfirmo fare de la Ĝ e n e r a l a K o n s i l a n t a r o.

PROPONOJ AL LA 10-a KONGRESO

1. La abontarifo al "S-ulo" por nemembroj estu je kvarono pli alta ol la tarifo por membroj. *Motivigo:* La diferenco inter abontarifo por membroj k tarifo por nemembroj estas ĝis nun tro bagatela. Ekzemple por Germanio estas la diferenco nur unu marko; sekve la membroj ne havas konsiderindan profiton. Per la proponita malgranda plialtigo de la abonprezoj por nemembroj ni certe ne perdos abonantojn k la organizo profitos. K. H. (3550)

La propono estas subtenita en la kunveno de la Leipziga SAT-anaro je la 4. 5. 30.

2. La Jarlibro ne plu enhavu adresojn de ĉiuj membroj, sed nur tiujn de Perantoj, fak-perantoj, k krome de tiaj membroj, kiuj speciale pagas por la enpreso de sia adreso. Anstataŭe la Jarlibro enhavu riĉan enciklopedian parton.

Motivigo estas presita en n-o 298 ("Pri ñovaranĝo de la Jarlibro").

Ĉirkaŭ la 10-a Kongreso

Responde al la sciigo de K-do Weder pri kongresteatraĵo (vd. n-on 296), mi volas anonci, ke la K. K. jam en Londono preparas tion. Aro da Londonaj SAT-anoj prezentos la klasbatal-tendencan teatraĵeton "La Batalo daŭras", ĉe la Oficiala akcepto k bonveno. Tamen, se Gek-doj entreprenos prezenti "La Ligno-vermo" kun internacia ludantaro, tio ankaŭ povas esti prezentata ĉe la fino de la Kongreso. Sed la Londonanoj ne povos aktive partopreni la teatraĵon, krom rilate al la hal-aranĝoj.

Ano de la Kongresa Komitato. 11 883

La Gek-doj el Leipzig, preparante sin por la 10-a Kongreso, decidis en la lasta SAT-kunveno aranĝi karavanon por ricevi pli malmultekostajn biletojn por la veturado al Londono. Estas necese, ke ne malpli ol 25 Gek-doj anoncu sin. Sekve ĉiuj K-doj, veturontaj de k trans Leipzig, turnu sin plej baldaŭ al

K-dino *Hel. Jungnickel*, vicperanto por 10-a SAT-Kongreso, Lindenthal-Leipzig.

Atentigo! Volontuloj, kiuj volas kunludi ĉe "La Lignovermo" en Londono, bonvolu skribi (pro tempoŝparo) ne al la Novjorka adreso de K-do Th. Weder (vd. en n-o 296), sed al Sidejo de SAT, 23 rue Boyer, Paris XX.

Raporto pri la kurso por kursgvidantoj

Je la 31. 5. k 1. 6. 1930 okazis distrikta kurso por kursgvidantoj en Naturamika domo Grosŝtajnberg (*Grosssteinberg*) apud Leipzig. Reprezentitaj estis 7 grupoj kun 19 kursgvidantoj k 21 gastoj. La temoj de l' kurso estis: 1. Historio de kelkaj artefaritaj lingvoj. 2. Literaturo k gazetoj en esp-o. 3. Instruado de esp-o per "Linguaphone" (gramofondiskoj). 4. Rekta instrumetodo. 5. Transitivaj k netransitivaj verboj kun "ig — iĝ". 6. Kiel utiligi la kantojn por nia movado? Krome ĉiu partopreninto estis devigata verki artikoletojn de minimume 20 linioj pri la temoj: 1. Kiel mi gvidas esp. kurson? 2. Kiel mi imagas pli efikan propagandon por esp-o? k paroladi dum 5 minutoj pri iu ajn temo al li konata. Resume estas direnda, ke por la kursgvidantoj estas vere necese scii ion pri la historio de la ĝis nun kreitaj lingvoj artefaritaj, ilia evoluo k vivo ĝis la nuntempa esp-o. La artefarita lingvo jam delonge pruvas ĝian taŭgon kiel interkomprenigilo internacia k pro tio jam fariĝis vivanta lingvo.



Krome la gvidantoj devas scii ion pri la esp. literaturo k gazetaro propagandonte ĉe korporacioj aŭ organizoj pri la valoro k disvastigo de esp-o en internacia skalo. En tiu ĉi afero oni turnu sin al la redakcioj de niaj lab. esp. organizoj, de kiuj estas havebla propagandmaterialo (esp. gazetoj, broŝuroj, prospektoj ktp.). Por korekte elparoli la lingvon oni legu k studu la riĉenhavan literaturon eldonitan en diversaj sciencaj kampoj. El tio oni lernas por la praktiko. Per gramofondiskoj estis montrata, kiel oni ankaŭ povas lerni facile esp-on nepartoprenante kursvesperon. Por meminstruo tiu ĉi metodo jam estas tre interesa k ankaŭ postulas sufiĉe da energio, volo k persisto de la lernanto, sed la ĉefafero por ni laboristoj estas la prezo k tiu ĉi estas sufiĉe alta (kompleta kurso kun 15 diskoj k lernolibro kostas 140 mk. g.). La verkado de artikoletoj devis montri al ni parton el la praktika laboro de la kursgvidantoj. Sed fakte verkis tiajn artikoletojn plejparte nur la lernantoj ankoraŭ junaj en nia movado, k ilia laboro estas sufiĉe laŭdinda kompare al la tempo de ilia lernado. Por kelkaj malnovaj esp-istoj tio estas bona ekzemplo. Same la 5-minutaj paroladetoj bone sukcesis kaj montris, ke ankaŭ novaj esp-istoj jam povas paroli esp-e pri konata temo. La 5-minut-parolantoj traktis jenajn temojn: Praktika esp-instruado. Ĝeneralaĵoj pri la esp. k politika vivoj. Signifo de la renkontiĝo de ruĝaj sportuloj en Erfurt. Raporto el fabriko por agrikultura maŝinkonstruado (pri la produktado). Kritiko pri la okazanta kurso. Kiel oni propagandas esp-on. Kiel mi fariĝis esp-isto? Kial la virinoj ne kunlaboras en la esp. movado? Pri la ekonomia stato de la bakistoj.

Ĉe la temo: Kiel ni utiligas la kantojn por nia movado? ni ĉiuj praktike kunlaboris. En amasa ĥoro ni lernis tekston k poste la senco de l' kanto estis priparolata per demandoj k respondoj. Ĥora kantado kronis la komunan laboron, k tiel finiĝis nia kurso por kursgvidantoj.

Distrikto Leipzig: SAT-ano 7 046.

UEA-delegito k mallibereja direktoro kontraŭ SAT-ano-malliberulo

El letero, kiun al la Redakcio komunikis K-do *O. Bässler*, Leipzig, de K-do *H. Heinrich* montriĝas, ke al tiu ĉi K-do kondamnita je longjara mallibereja puno, en fortikaĵo *Golnov* (Gollnow), de nun estas malpermesita ricevi "S-ulo"n dank' al la "komplezo" de UEA-ano. "Jam de pli longe ol plenan jaron mi abonis nian karan gazeton", skribas K-do H. "... Ofte kiam mi legis la interesan enhavon, precipe vojaĝ-priskribojn aŭ "Tagon el mia Vivo" ktp., mi preskaŭ pro entuziasmo forgesis ĉirkaŭan mizeregon. Nun laŭdevige mi devas rezigni je tiu instigilo. Eble mi fartas tro bone... ĉu?" Kaj tio okazis jene: La Direkcio de l' malliberejo havis iun tagon la ideon esplori pri la karaktero de la esp. legaĵo, kiun ricevis K-do H., k trovis bona sendi ekzempleron de "S-ulo" (k "Arb. Esperantist") al UEA-delegito en Stettin, rektoro Krieger, kiu prononcis jenan juĝon: "Ambaŭ gazetoj laŭtendence estas laborist-klasaj organoj — *k "S-ulo" havas sovetieman karakteron"*. Kompreneble tiu informo pri sovet-tendenco sufiĉas por nuligi la permeson por tiu K-do ricevi "S-ulo"n. Kaj tamen ni posedas atestojn ankaŭ el neŭtralulaj rondoj, kiuj akcentas la objektivan raportadon k prezentmanieron en nia gazeto... Kia heroaĵo, sinjoro Krieger!

La mankoj en nia korespondado

Mi ne celas kritiki la skribemon de multaj Ge-SAT-anoj, sed ilian mankon je precizo k je ordo en la elekto de iliaj "eblaj" korespondantoj. Por esti pli facile komprenata, mi citas la ekzemplon, kiu igas min skribi: Antaŭ kelka tempo la Lab. Esp. Grupo el Ĝenevo petis, per anonco en "S-ulo", materialon por ekspozicio. Tiu anonco precize sciigis, ke la materialo devis esti ricevita antaŭ la 5-a de aprilo. Malgraŭ tio la grupo ricevas ankoraŭ nun multajn leterojn, en kiuj ne temas pri materialo, sed ĉefe pri korespondpetoj. Kio rezultas? La grupo ne povas respondi ĉiujn demandojn, ĉar mankas al ĝi tempo. Due, la sendintoj, ne ricevantaj respondon, perdis multe da tempo k mono. Ne mirinde estas, ke skribemuloj ne ĉiam kontentiĝas per korespondado. Sed nur ili kulpas. Ili do elektu pli taŭge siajn korespondantojn. *A. L. (14 303).*

*

Kun bedaŭro mi informas pri jenaj K-doj, kiuj anoncis pri korespondado k ne respondis al leteroj senditaj (en tempo de 16. 3. ĝis 2. 4. 30): 1. Ĉeĥosl., K-do R. Leŭtelt, 2. Germ., Fr. Giefer, 3. Jugosl., K-dino Ana Gutman (laŭ "S-ulo" n-o 283); 4. Britio, S. Leitch; 5. Francio, J. Cavaille; 6. Hispanio, E. Garos; 7. Kanado, Esp. grupo; 8. Nederl., Bruins (laŭ "S-ulo" n-o 282). Mi ne konas motivon de ilia silento (perdo, cenzuro ktp.), sed necesas klarigi pri tiuj malgajaj faktoj, ĉar tio tre malsukcesigas propagandon por esp-o. Ni ĉiuj, 200 personoj, atendas respondojn k deziras sciiĝi pri la kaŭzo de l' silentado al niaj leteroj.

Novoĉerkask (Sovetio).

*

Mi anoncis en "S-ulo" n-o 283. La temoj, pri kiuj mi deziris korespondi, estis jenaj: PM, bfl k stenografio, sed multaj K-doj skribis al mi flanke de tiuj temoj. Unu skribis pri kinematografio, alia pri arto, ktp. Kelkaj subskribis tute nelegeble, eĉ K-do el

Leipzig nelegeble subskribis k . . . forgesis indiki sian adreson!

Sendube mi ne intencas pravigi la kulpojn de kelkaj K-doj, sed, antaŭ ol plendi certigu vin, ĉu vi mem ne estas la ĉefaj kulpuloj. *8733 (Francio).*

Pri represoj el "S-ulo"

Por ĝusta statistiko k sekve trafa efiko ĉe publiko de nia porep-a laboro, mi proponas al ĉiuj Gek-doj, kiuj represas iajn artikolojn el "S-ulo" k aliaj SAT-organoj en siaj naciaj gazetoj, nepre sendi krom koncernaj n-oj al Redakcio de "S-ulo" ankaŭ 1 aŭ 2 ekzojn al la verkinto de l' artikolo, trovante lian adreson, se eblas en la gazeto mem aŭ en Jarlibro. Rilate al terorlandoj, se gazetoj venas el Sovetio, oni devas komisii la peradon al Red. de "S-ulo" aŭ Adm. de SAT aŭ Esp.-Servo de SAT. Tio certe ofte instigos la verkintojn al plua laboro k donos ankaŭ bonajn materialojn por propagando de esp-o.

Vjaĉeslav V. Kalaŝnikov (1125),
Niĵnij-Novgorod.

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro **ne** estas por korespondemuloj)

(Dua parto. 11-a daŭrigo. Vidu n-on 284/98)

Thalheim (Erzgebirge, Germanio)
16149 *Graupner Arth.*, Städt. Neubau 4, ŝtrumpfaristo.
16145 **Hanisch Kl.*, Friedrichstr. 1-a, hejmlaboristino.
16144 *Lehm Kurt*, Am Städt. Neubau, ŝtrumpfaristo.
16148 *Müller Karl*, Friedrichstr. 8, ŝtrumpfaristo.
16150 *Plötner Kurt*, Städt. Neubau 4, konstrulaboristo.
16139 *Rehm W.*, Untere Hauptstr. 26-b, ŝtrumpfaristo.
16142 *Scherzer Alfred*, Jägerstr. 6, ŝtrumpfaristo.
16147 **Schönland Ruth*, Wallstr. 7, ŝtrumpfaristino.
16137 *Schönland W.*, Städt. Neubau 6, ŝtrumpfaristo.
16146 **Sonntag Joh.*, Wilhelmstr. 5, ŝtrumpfaristino.
Tiflis (Sovetio)
16069 *Bibilejŝvili Konstantin*, Noriiskij podem 29, asekurlaboranto.
16071 **Ŝilakadze Lidio*, I-aja gonĉarnaja 10.
16070 *Tesler Mikaelo*, ul. Serebrjanaja 33, teknikisto.
Tours (Francio)
16335 *Chabot Albert*, rue E. Vaillant 252, fervojisto.
Trondhjem (Norvegio)
16228 *Lövli Ivar*, Krombodveiten 2.
16229 *Lövli Torvald*, Krombodveiten 2.
Turku (Finnlando)
16260 **Luoto Hellä*, Birgerinkatu 5, kontoristino.
Vaasa (Finnlando)
16054 *Kanerva Veikko*, Pitkàkatu 42, kontoristo.
Vallauris (A. M., Francio)
16338 *Reolon Theodore*, Propriété Condal, quartier Subreville, masonisto.
Vänersborg (Svedio)
16243 **Wiklund Ester*, A. B. Bostäder.
Velij (Sovetio)
6766 *Bogdanov V.*, ul. Volodarskogo 33.
Vidriña (Siberio, Sovetio)
16206 **Parĝina Ano*, Sovetskaja 25, Semipalatinska distr., instruistino.
Volsk (Sovetio)
16197 *Malaĥov K.*, Sebastopolstr. 10.
16196 *Ŝtemanitjan*, Sebastopolstr. 10.
Warszawa (Polio)
16063 *Dybowskie Jos.*, Piekna 54, m. 25.
16062 *Rosloniec Stefano*, Piekna 52, m. 28.
16053 *Szemiot Wl.*, ul. Drewniana 7, m. 23.
Weisstein (Silezio, Germanio)
16173 *Arnold Erich*, Hartauer Str. 14-a, ilseruristo.
16172 *Böer Gustav*, Hauptstr. 90, konstrulaboristo.
Weisswasser O.-L. (Germanio)
16276 *Borrmann Rich.*, Johannastr. 18, vitrofacetisto.
Wien (Aŭstrio)
16120 *Dalamasl St.*, VIII, Stolzenthaler Gasse 4/5, ŝuisto.
16130 *Slawinsky Eduard*, XIII, Gurkgasse 57/16.
Wunsiedel (Bavario, Germanio)
16291 *Haupt Konrad*, Alte Landgerichtsstr. 30.
Zamora (Hispanio)
16319 *Pertejo José*, str. Sta. Clara 32/34.
Zaporoĵje (Sovetio)
16199 *Bublikov Nikolao*, Miheloviĉ 4, kv. 8, seruristo.
Zoppot (Lib. Urbo Danzig)
16101 **Marx Margareto*, Schmiedestr. 3.
9923 *Mehr Erwin*, Waeldchenstr. 1, arĝentisto.
Zürich (Svisio)
16169 *Eggimann Franz*, Glockengasse 3, meblisto.
16268 *Läubli August*, Hirschengraben 74, masonisto.
Plus 24 membriĝoj en terorlandoj kaj 8 pasivaj.
Entute: 408 aliĝoj.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

HISPANIO. La kastillingvanoj el Eŭropo k Ameriko bonvolu atente legi alvokon de Barcelonaj, Sabadellaj, Rubiaj k Tarrasaj SAT-anoj, kiu aperos en unu el proksimaj n-oj. Ĝi estas grava, tial ke ĝi eble estos la bazo por nia plua nova agado. Temas pri federaciiĝo klascele, pri kastillingvaj eldonaĵoj rilate al instruado k eduko. De ĉiuj ni dependas la sukceso. (357.) — *NEDERLANDO.* En "Lab. Esperantisto" ni trovas alvokon por karavana veturo de nederlandanoj al la 10-a Kongreso. Proponite estas forveturi el Vlissingen sabate, 2-an de aŭg., je 13.20 h. Oni skribu al G. P. de Bruin, *Enschede* (v. Jarl.). La raportoj el div. grupoj montras viglan agadon de lab. esp-istoj en tiu lando. — *Polio.* Dank' al iniciativo de K-do Lederman estas aranĝita kurso laborista en Volbrom. Partopr. 15 p. Gvidas K-do Wajcman el Olkusz (15 875) laŭ "Petro". A. W. — *SOVETIO. Odessa.* Je 18. 5. okazis konferenco de aŭskultantoj de esp. disaŭdigoj ĉe Odesa Radio-Centro. Aŭskultinte raporton pri farita esp. laboro ĉe radio: disaŭdiĝis 3 priesp. lekcioj, 2 lekcioj pri historio de esp., 16 kurs-lecionoj, 11 esp. lingvaj rap., 2 esp. leteroj, 3 salutoj, 67 tradukoj de eksterl. let. ricevitaj, 1 saluto al Rur-laboristoj; kunligiĝis la Centro kun proletoj el 14 landoj (ĉiuj K-doj povas kunlabori ĉe Esp. Bulteno Radia!), — la konferenco decidis pri plano por estonta laboro: organizi SEU-ĉelon, esp. korespondantojn, novan elementan kurson, superan kurson, esp. paĝon en radiogaz., ktp. (5459.)

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

B. Eidelman k N. Nekrasov, Sennaciismo kaj internaciismo. "Komunista Biblioteko", Moskvo 1930. La broŝuro estas eldonita per la zorgoj de la aŭtoroj. La lingvaĵo estas kontrolita de Lingva Komisiono ĉe SEU. 48 pĝ. Formato 11,5×15 cm. Prezo: 25 kop. (0,50 mk. g.). Deponejo: CK SEU, Spiridonovka 15, *Moskvo.* Por alilandoj: R. Lerchner, Colmstr. 1, *Leipzig O 27.*

Mi dankas al la Redakcio de "S-ulo", ke ĝi sendis al mi por recenzi ĉi tiun pamfleton kontraŭ K-do Lanti. Mi ja loĝas en lando, kiu batalakiris sian nacian "sendependecon". La ĉi tieaj proletoj povas do ĉiutage sperti, ke por ili *nacia* sendependeco estas iluzio, farso, trompo. La proletoj el Polio, Estonio, Latvio, Turkio k. a. "sendependiĝantaj" landoj certe faras kiel ni similan sperton. Tion kuraĝis diri K-do Lanti en sia broŝuro "La Laborista Esperantismo". Kaj estas por mi k ankaŭ por miaj ĉi tieaj K-doj, kiuj ĉiuj apartenas al la III-a Internacio, tre mirige k ĉagrene konstati, ke du K-doj el Sovetio riproĉas al Lanti pro tio, ke li notis tiujn konstateblajn *faktojn.* Cetere en la tuta pamfleto oni vane serĉus eĉ plej etan provon por montri, ke tiurilate K-do Lanti eraris. Kun indigno oni nur povas konstati, kiel distorde, karikature estas prezentitaj en tiu pamfleto la ideoj de Lanti por provi konvinki simplanimajn legantojn, ke lia broŝuro estas "tre utila por la kapitalistoj" (pĝ. 30).

Tia pamfleto, evidente verkita por celo de mi nekomprenebla, ne meritas longan recenzon. Ni aldiru tamen, ke la rezonmaniero de K-do Nekrasov, aparte, tute similas tiun de niaj ĉi tieaj naci-socialistoj. Kaj oni ne kredu, ke miavice mi distordas la ideojn de la aŭtoro; jen mi citas: "La batalo de malgrandaj popoloj por sia sendependiĝo estas batalo justa k utila por la klaso laborista, ĉar ĝi plirapidigas nian movadon al nia ĉefa celo — al la socialismo" (pĝ. 41).

Tamen ni, proletoj en sendependiĝinta lando, spertis, ke tiu "batalo justa k utila" estas plej taŭga ne por klaso laborista, sed por la fortiĝo de kapitalista reĝimo, kiu per ĉiuj rimedoj (religiaj, lernejaj, historiaj ktp.) inokulas la nacian ŝovinismon en la socialistajn partiojn, subtenante la social-faŝistan (patriotan) movadon k semante antagonismon kontraŭ alinaciaj laboristoj. Ĉu tio "plirapidigas nian movadon al nia ĉefa celo — al la socialismo"? La SAT-anaro juĝu objektive mem, ĉu laŭnacia apartigo de proletoj aŭ sennacieca, prefere sennaciisma kunfandiĝo, fratiĝo de l' tutmonda proletaro kondukas plej rapide al nia socialisma celo.

J. Perhak (13 394.)

Paul Fruictier, Kompleta Gramatiko k Vortfarado de Esperanto, reviziita k kompletigita de *S. Grenkamp-Kornfeld.* Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jaslo, Pollando. Presis: Belga Esperanto-Instituto, Antwerpen. 187+V paĝoj, 22×15 cm. Prezo: 5 svisaj frankoj. Havebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Jen bona libro en Esperantio. Ĝi estas ja bona, ĉar ĝi respondas al internacia lingv-instrua bezono en esp. movado k bone plenumas sian celon, kvankam ĝi estas kompilaĵo. Pro tiu bezono de kompleta gramatiko, en lastaj jaroj aperis diversaj gramatikaj libroj eldonitaj de landaj esp. societoj; el ili mi citu "Nova Gramatika Libro" de D-ro Anakreon Stamatiadis (Grekio) k "Teorio de Esperanto" de K-do V. Varankin (Sovetio). Kvankam esp-e verkitaj k en tutmondo studeblaj, tiuj du lastaj verkoj prizorgas ĉefe la instruadon de samlandanoj k estas nekompletaj.

La verko de Fruictier-Grenkamp

estas certe pli kompleta, laŭ scienco, pedagogio k tipografio pli klara k bone prezentita. En ĝi abundas ekzemploj de Zamenhof k aliaj bonaj verkistoj. Ĝi plene taŭgas por tiuj, kiuj volas perfektiĝi en scipovo de esp-o k ne timas ellerni la malfacilajn problemojn de ne tro simpligita pensesprimado. Bone sciu esp-istoj, ke tiuj laboremaj lernantoj, kiuj studis la lingvon eĉ per kompleta lernolibro, konas nur la elementan esp. praktikadon. Kvankam restante sur sia fundamenta bazo, esp-o jam de longe eliris el sia infaneco; ĝia tutmonda uzado malkaŝis, efektive naskis regularon pli kompletan ol la 16-regula fundamenta gramatiko k per tio la lingvo daŭrigas plibeliĝi, pliglatiĝi, fariĝi pli esprimkapabla, pli eŭfonia, pli bela. La verko de Fruictier-Grenkamp penetras la kampon de laŭnuanca esprimado k montras en esp-o tian delikatan esprimilon, kian nacia lingvo ne povas superi, eĉ egali.

Mi ne diras, ke la nova libro estas perfekta, sed nur ke ĝi estas bona k ke ĝi tre utilos. Ĝi ja estas kompilaĵo el du malnovaj verkoj de Fruictier iom modernigitaj de Grenkamp k taŭge kompletigitaj per la bonega raporto de akademiano Walter Lippmann "pri la uzado de la refleksiva pronomo en esp-o". Malnovaj esp-istoj lingve progresemaj, kiuj estas interesataj pri evoluo de esp-o k ankaŭ novuloj allogataj de sciencaj diskutoj pri esp-o (esperantologio) certe opinios la libron iom nemoderna. Kvankam ĝi sekvis la regulon "konstati, ne proponi" k "tiamaniere restis fidela al la observa metodo, kiu regas la lingvan sciencon", la "Kompleta Gramatiko..." ne registras la tro novajn esp. formojn, ekzemple: kelkiu, kelkies, aliu, alies... ĉi libro (anstataŭ: tiu ĉi libro)... leguta, legunta (kiu estus legata, leganta)... Eble prave, ĉar la libro ne estas destinata al esperantologoj, sed al praktikantoj. Tamen en ĝi oni mencias novajn sufiksojn *io, iv, end, iz* k prefikson *retro*, ne kondamnante ilin.

Estas strange, ke oni ne mencias en la libro la germanan manieron esprimi la tempon horan. Ekz.: Estas kvarono de la tria (= Estas la dua k kvarono). Tiu formo iom malnoviĝis, tamen estas ankoraŭ uzata. La distingo inter vasta k malvasta elparoloj de sama vokalo en esp-o ŝajnis al mi erara restaĵo el diroj de eksesp-istoj Moch k De Beaufront. Pli k pli unueciĝas la prononcado de esp-o k veriĝas, ke esp. konsonanto havas nur unu sonon, ĉiam k ĉie la saman. Oni ne prononcu: pòrdó, kòlòró, fèsté, sékrèté, sed pòrdò kòlòrò, fésté, sékrété...

Resume, la libron mi rekomendas al la SAT-K-doj, kiuj en ĝi trovos multon nesciatan.

M. B.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

The Los Angeles Citizen, 16. 5. (El Montevideo, 290); *Geillustreerd Volksblad, Rotterdam,* 6. 2., virino en Turkest.; *De Vrije Socialist,* Zandfort, 14. 5., el Polio, 4. 6., faktoj.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Socialist Youth, Newcastle, majo, esp. rubriko prizorg. de nia K-do Latimer (10 637); *Der Volkslehrer,* Langensalza, 25. 5.; *Die Sonntagszeitung,* Stuttgart, 25. 5.; *Accion Cooperatista,* Barcel., 30. 5.; *Daily Worker,* London, 31. 5.; *Signalen,* Stokh., 29. 5., 5. 6.; *Le Sincériste,* Waltwilder, junio (en esp.); *La Voz* (lernant-gaz.), Cordoba, majo, n. 17; *Accion,* Puente Genil, 26. 5.; *Der Freidenker,* Berlin, junio; *L' Effort,* Lyon, 31. 5., 7. 6. (2 artik.); *ISK* (germ. eld.), Göttingen, junio; *El Socialista,* Madrid, 20. 5.; *Münchener Post,* 14. 5.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 31. 5.; *The Labour Woman,* London, junio (notoj en esp.); *L'Internationale de l'Enseignement,* Paris, majo, priparolas LNE (jan.) k Senn. Ped. Revuo (kun trad. de l' redaktora enkonduko); *Vsjegda gotov,* Ivanovo-Voznesensk, 30. 5. (trad. el "Diablidoj"), 20. 5. (surskribo en esp.).

Peresper. materialon enpresis:

Neue Zeitung, München-Nürnb. 2. 5.

NIA POŜTO

2474. — Ni ricevis viajn multnombrajn manuskriptojn; ĉu ni povos enmeti parton da ili, dependas de la disponebla spaco. *Red.*

14 624. — Se la unueco de SAT postulus, ke mi ĉesu skribi eĉ vorton en la SAT-organoj, mi ja estas preta je tia rezigno. Kial ne? — Via artikolo pri "Kalendaro" aperos, sed ne en la 300-a n-o. *E. L.*

LA "DAILY WORKER" (LONDONO)
(Ĉiusabata n-o enhavas esp. notojn)

La sola komunista ĉiutaga ĵurnalo en Britio serĉas lab. koresp-antojn en ĉ. landoj, ĉefe en j. landoj: Mediteraneaj, Balkanaj, Sud-Amerikaj, koloniaj, Britaj k ne-Britaj; proksimaj k malproksim-orientaj. — *Tre ŝatataj temoj:* Sklavigo k ribelagoj de indiĝenoj; labor- k vivkondiĉoj en kolonioj; strikoj, kapitalista raciigo, agadoj de rev. k reformemaj profunuiĝoj, salajroj, laborkondiĉoj, senlaboreco; manifestacioj, kontraŭfaŝista agado, persekutado al lab. movado ktp. — Komunistaj, junulaj, virinaj, sportaj, kulturaj, lab. defendaj temoj, militpreparoj kontraŭ Sovetio. — Kolektiva koresp-ado preferata. — Sendu esp. afiŝojn, reklamojn, flugfoliojn, skizojn ktp. Adr.: La "Daily Worker" (Esperanto), 41 Tabernacle St., *Londono, E. C.* 2 (Anglio).

Esperanto-Societo "Progreso"
Wien X, Ettenreichgasse 4/31
ĵus aperigis tre interesan, sciencan prelegon pri
LA MORTADO
de univ.-profesoro d-ro Herm. *Nothnagel.*
27 pĝ. en formato 15×22½ cm.
Prezo 1 mk. g.

KORESPONDADO

AŬSTRIO

K-do Halling Walter, studento, koresp. kĉl, krom Germanio precipe per PI. *Wiener-Neustadt,* Emmerberggasse 60.

K-dino Adolfine Narsoun, Löhrgasse 15, *Wien XV.,* kĉl seriozan koresp-adon.

K-do Siegfried Gugler, Viehofener Str. 16, *St. Pölten,* kĉl, L, PK, PM, bfl. Resp. garantiata.

Atentu filatelistoj! — Aŭstriano interŝ. aŭstriajn PM kontraŭ PM ĉl. Adr.: Karl Reiter, Zentralbad, *Bad Ischl.*

BRITIO

K-do J. Mitchel, 34 St. Thomas Road, Finsbury Park, *London, N. 4,* kun okulistoj k okulvitr-fabrikistoj en Sovetio. Interŝ. L, esp. k ruslingvajn gazetojn. Resp. garantiata.

FINNLANDO

K-do Arthur Tähtinen, Sofiankatu, 7, B. 7, *Turku,* kĉl, interŝ. fotojn kun amatoroj.

FRANCIO

K-do Jak. Müller (16 390), ne plu loĝas en Rheinhausen, sed lia adreso nun estas Jak. Müller, cilindristo, *St. Ingbert,* Seyenstr. per N. 16, Saar.

GERMANIO

K-do Gg. Kraus, Schwanenstr. 2, *Rheingönheim/Pfalz,* kĉl, pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

— Viglan koresp-adon garantias 20 Gek-doj pri ĉ. temoj kĉl. Adr.: E. Winkelmann, *Alt Brand, n-o 9 ap. Zwickau/Sa.*

K-dino Elfriede Keller, Piastenstr. 24, *Breslau,* kĉl, kolektas PM. Resp. garantiata.

HISPANIO

K-do L. Buron, Str. Fivaller 125, *Sabadell,* kĉl, pri ĉ. politikaj temoj.

PORTUGALIO

K-do Joaquim Pudrade, Rua Luiz Camoes 11, *Lisboa,* petas pardonon pro nerespondo al ĉ. K-doj. Dankon!

ENHAVO:

	pago
Impresoj pri la situacio en Palestino	439—440
Polaj laboristoj en Francio	440
El usona taglibro	441
La evoluo sen dio	441
Turksib	442—443
Tago el mia vivo	443
Diskutejo	443
Por nia distro	443
Esperanto-Servo	444
Sennaciula Scienc-Kultura Paĝo	445
Tra Esperantio	446—450
Korespondado	450

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)